



# Kajeroj el la Sudo



ISSN 1886-1997

La 30<sup>a</sup> jaro

Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k104/k104.html>

ELECCIONES  
GENERALES 2019

28 ABRIL



## Allegro Mágico



**VEGAMEDIA PRESS.COM**

Toda la verdad, solo la verdad y nada más que la verdad

Miércoles, 10 de abril de 2019

Última actualización: Domingo, 7 de abril de 2019 10:25



Hemeroteca | Publicidad | Nosotros | Temas de actualidad

Portada	Discantus Magacine	La toga solidaria	Editorial	Enfocando Murcia	Opinión	Región	Política	Actualidad	Murcia	
Cartagena	Vega Media	Mazarrón	Valle de Ricote	Belleza	Laboral	Tribunales	Medio Ambiente	Entrevistas	Armenia	Economía
Deportes	Cultura/Ocio	Club VMPress	Empresas	Hablando de libros	Guía Gastronómica	EUGEN				

## Balotado 2019

N<sup>o</sup> 104<sup>a</sup>

Majon 2019

# Kajeroj

Bulteno de la Hispana Asocio de  
Laboristoj Esperantistaj  
(HALE).

**el la Sudo**  
**Calle Jabonerías, 6.3º D**  
**30010 Murcia**  
**Hispanio**

## Enhavo

Redaktore: Renverso.....	3
Muziko kaj infaneco.....	3
Artistoj kaj intelektuloj.....	4
Aprilo 28ª.....	7
Etaj partioj.....	8
Neperfekta estonto.....	10
Sub alies flago.....	12
Programoj '19.....	14
La peko de l' talibano: ĉ. 11.....	15
La Faraono, ĉ. 53.....	17

ISSN 1886-1938 (printita)

Prezidas: Johano A. Cabezos.

Redaktas: Jesuo de las Heras.

Korektas: Jozefo Pina.

Retskribu al: kajeroj@gmail.com

Oni povas reprodukti la enhavon,  
kondiĉe, ke oni citu la originon.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas  
ties aŭtoroj, ne la redakcio.

Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj,  
kvankam ni klopodos publikigi ĉiun  
artikolon, kiun ni trovos interesa kaj kies  
enhavo mistraktas nenium personon.

**Kovrilo:** Claudia Ortiz esas meksikanino, kiu mastrumas interretan paĝon kaj muzikprogramon *Allegro Mágico* por diskonigi klaskan muzikon en infanaĝon... Ni salutas tiun bonegan ideon.

**Pagmaniero:** aliĝu al HALE kontraŭ €10 jare por ricevi la surpaperan version de nia magazino.

**Konto** **ES30 2100 4617 4122 0011 5275.**

Notu vian nomon kaj la jaron, kiun vi pagas.

Poste, sendu noton al  
[kajeroj@gmail.com](mailto:kajeroj@gmail.com)

Ankaŭ eblas protekti la magazinon pere de donaco al la menciita konto, se oni deziras helpi kaj tamen ne ricevi la surpaperan version.

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuksaj rimedoj:  
OpenOffice Writer, Gimp, Scribus, gFtp kaj Bluefish.

Nesubskribitajn  
artikolojn verkis  
la redaktoro.



## Redaktore **Renverso**

**K**iam nia bulteno unue aperis, nur la surpaperan formaton ni uzis. Poste, ĝi venis unue surpape, kaj kiam la redaktoro konsideris, ke ĝi jam atingis niajn aliĝintojn, ĝi aperis sur formatoj PDF kaj HTML. Laste, unue kreigis la PDFn formaton, kaj kelkajn tagojn poste mi enretigis la HTMLan formaton, kiu estas pli komplike krei, sed malpli peza por legi sur komputilo aŭ poŝtelefono; kaj finfine mi sendis la surpaperan version al niaj abonantoj.

Tamen, ĉifoje mi konsideris inversi la procedon, pro la tuja kialo, ke la hispana balotado venas tiom proksime. Jes, kun tempo mi lernis krei la HTMLan formaton per pli facila maniero, kaj mi komprenas, ke ĝi estas la plej rapida maniero atingi la

atenton de la leganto de **Kajeroj el la Sudo**. Ne serĉas mi, tamen, influi en la balotado, ĉar fakte ni ne estas multaj, sed nur pripensigi niajn legantojn pri politikaj aferoj en Hispanio, kaj ĉefe lasi ĉi tie ateston pri tio, kio okazas en Hispanio. Jes, tiu ĉi artikolo estu mejlŝtono por referenco en la estonto, se eblas. Ĉar ni estu atestantoj pri tio, kio okazas en la nuna Hispanio. Legantoj estas invititaj komenti la socialajn kaj politikajn aferojn de nuna Hispanio en niaj paĝoj.



## **Muziko kaj infaneco**

**M**uzikarton oni devas lerni de infanaĝo, aŭ almenaŭ oni devas promocii intereson pri muziko inter infanoj, laŭ mia eltrovo. Tion oni povas trovi troa, sed fakte ĉio estas muziko en nia vivo: nia respiro, nia marŝado, eĉ nia rigardo havas ritmon, kaj iusence ankaŭ melodion.

Tion ja komprenis Klaŭdia Ortis', kiu agas favore al tiu ideo pere de sia retpaĝo **Allegro Magia** (<http://www.allegro magico.com>), kien regule ŝi aldonas eron kun komentoj pri gravaj temoj muzikaj, kiel, ekzemple, kiuj estis ĉefaj komponistoj, kiel Beethoveno, Baĥ, Mozart, kaj ankaŭ temoj muzikaj, kiel *Kio estas opero?*, aŭ *Maro kaj muziko*.

Se oni vizitas ŝian retejon, oni trovos ankaŭ ligojn, kiuj permesos al vi aŭskulti la duonhorajn muzikajn programojn aparte pensitaj por infanoj, kvankam ili estas vere podkasto, kiujn oni preferinde aŭskultu pere de apartaj aŭdigiloj, kiel Pocket-Podcast, ThePodcastApp, aŭ Ivoox, inter multaj aliaj, kiuj permesas aŭskulti radioprogramojn pere de via poŝtelefono, tableto aŭ komputilo.



## **Artistoj kiel intelektuloj**

de Alberto Buela\*

**E**n socio kiel tiu nia, konsumisma, riĉega, kies dio estas merkato, la imago anstataŭis koncepton. Pro tio, ke oni ĉesis legi kaj komencis rigardi, eĉ se malofte oni vidas.

Kaj sekve artistoj, aktoroj, kantistoj, anoncistoj kaj registoj televidaj anstataŭis intelektulojn.

Tiu anstataŭo venas el alia pli profunda: kiam intelektuloj, ĉefe de la Franca Revolucio, venis anstataŭi filozofojn. Vere daŭre estis filozofoj, sed la ĝenerala sinteno laŭ tiuj du jarcentoj signalas ilia publika malapero.

Progresismo, tiu infaneca malsano de socialdemokratio, trajtiĝas el prenado de avangardo kiel metodo kaj ne kiel batalado, kiel okazis en malnova socialismo.

Ankoraŭ ekzistas en Barcelono la nalnova ĵurnalo **La Avangardo**.

La avangardo kiel metodo signifas, ke por progresemlulo oni devas esti kontraŭ vento kaj tajdo, ĉiam sur la ondokresto. Ĉiam antaŭen, en avangardo de ideoj, modoj, uzadoj, kutimoj kaj sintenoj.

Progresema homo ciam troviĝas en ekstazo ostempa: nek prezento nek, kompreneble, pasinto, havas por li ian ajn signifon, kaj se jes, tio estus nur surbaze de la estonto. Ne interesas al li la etiko de la Historia Nacio, eĉ li agas kontraŭ tiu karaktero historia-kultura. Kaj tio es tial, ĉar progresemluloj estas sia propra projekto. Li instaliĝas en la estonto ĉar li adoptis la avangardon kiel metodon. Neniu aŭ nenio povas esti antaŭ li, ĉar alimaniere li ne plu estus progresema. Tiel klariĝas tio, ke la progresemlulo ne povas koncepti projekton pri lando aŭ nacio, ĉar tiu projekto estus antaŭ

(\*) arkegueta, eterna komencanto. Oni povas komenti al aŭtoro pere de lia emajlo: [buela.alberto@gmail.com](mailto:buela.alberto@gmail.com)

li, kio implicas kaj kreas kontraŭdiron.

Kaj kiel oni ne povas doni tion, kion oni ne havas, progresemlulo ne povas doni al si aŭ al ni projekton politikan, ĉar li mem estas sia projekto politika.

La homo progresisma, tiu, kiu jesas ĉiun novaĵon, kion oni proponas, trovas en artistoj siajn intelektulojn. Hodiaŭ en nia konsumisma socio kie imagoj anstataŭis konceptojn, oni trovas, ke artistoj estas, definitive, tiuj, kiuj formigas per imagoj konceptojn. Kaj la eduko de progresemluloj konsistas el tio, sinsekvo de imagoj tranĉitaj de realo. *La homo festivus*, emblema figuro de progresismo, kiun priparolas pensistoj kiel Philippe Murray aŭ Agulló, trovas en artistoj sian ideologojn. Artistoj liberigas lin kaj el la devo legi (kutimo nepardoneble perdiĝanta) kaj el la konkreta mondo. Progresemlulo ne volas scii, sed nur esti sciigata. Li soifas pri novaĵoj. Kaj la mondo estas "lia mondo", kaj li loĝas en sia kristala sonorilo de malnovaj magazenoj kvartalaj kie la muŝoj (la popolo kaj ĝiaj problemoj) ne povis eniri.

Progresemluloj bonaeraj loĝas en Porto Ligno, ne en Parko Patrikoj.

Taktiko de registaroj progresismaj estas transformi la popolon en aron de konsumistoj, kaj sekve la popolo ne plu estis la ĉefa politika agento en ties komunumo,

Sir Spencer  
Olivier,  
emblema  
artista, rolas  
Rikardon 3<sup>an</sup>



cedante tiun protagonismon al amasmedioj, kiel ideologoj de amaso kaj al artistoj, kiel ideologoj de siaj propraj elitoj.

Tiu meĥanismo funkcias je du niveloj: a) en amasmedioj komunikaj, centoj da ĵurnalistoj kaj parolistoj, tiuj analfabetoj kulturaj babilemaj, laŭ trafa vortumo de Paul Feyerabend (1924-1994), diras al ni tion, kion ni devas fari kaj kiel ni devas pensi. Ili estas la mesaĝistoj de "iu sennoma" de Heidegger, kiu pere de diktatora "oni" (oni diras, oni opinias, oni faras, oni vestumas, oni manĝas...), subvenigas nin en netaŭgan ekzistadon. b) Pere de artistoj kiel tradukistoj pri konceptoj al imagoj en teatroj kaj kinejoj kaj por publiko pli limigita: por tiuj feliĉaj kun la sistemo.

Artistoj plenumas sian funkcion ideologian ene de progresismo ĉar ili kantas la senfinajn temojn de ties depostulado: gejan geedziĝon, aborton, eŭtanazion, adop-



ton de samseksemuloj, konsumon de mariĥuano kaj kokaino, batalon kontraŭ imperiismo, defendon de indiĝenismo kaj enmigrintoj, mal-kreskigo de punoj al krimuloj, okulsignon al marĝeneco, kaj longa ktp. Sed ili neniam kantas al nesekureco surstrata, prostituado, disvendo de infanoj, turismo pedofila, sendungeco, la kreskanta murdo kaj forrabo de personoj, ludado pro mono, kaj tiel plu. Ne, oni ne parolas pri tio, kiel en la filmo de Mastrojani'. Konklude, oni ne vidas la suferojn de socio, sed nur ties plezurojn.

Artisto, kiel aktoro, reprezentas ĉiujn tiajn teatraĵojn kie nur politikan korekton oni perfermas. Kaj tiusence, kiel Vitorio Messori' diras, unue venas misfamigi la eklezion, kritiki la socialan ordon, burĝajn kutimojn pri mezuro, modesteco, ŝparemo, pureco, fideleco, diligento, senco, defendante ties malojn. Ne ekzistas aktoro, kiu ne skandaligas parolante pri la judaj viktimoj de Holokaŭsto, kvankam neniu prezentas la kristanajn aŭ ciganajn. Tiel, se oni

prezentas Heidegger-on, ili montras lin kiel naziulon, kaj se temas pri Ŝtalino, kiel majstron de homaro. La papon, ĉiam kiel ekzekutiston, kaj monahinoj ĉiam estas koruptitaj, laŭ ili, monpruntistoj, almozuloj; kaj pandaroj, liberigantoj. Oni ne plu perfermas **La Merkatiston de Venetio**, aŭ **La burso** de Martel. La orĥestestro, kiu kuraĝas ludi Wagner-on restas ekskomunikita de la plico de penso.

Surloke, se oni perfermas **Martin Fierro**, oni preterlasas la kanton kaj duelon kun Moreno. Se Generalon Belgranon oni montras kiel doktoron, Peronon kiel burĝanon Kaj Evita-n kiel revoluciulinon, eĉ se la emblema rolo por ĉiu aktoro estas Ĉe Gevara'.

La tuta hermeneŭtiko teatra estas penetrita de psikoanalizo pentrita de hebrea logiko de Freŭd' kaj liaj centoj da disĉiploj. Logiko, kiu solviĝas en rekaptan de "la aliulo", sed por igi lin en "la samon", ĉar je la koro de tiu logiko, "la aliulo", kiel Jehovo, por Abraham', estas vivita kiel minaco, kaj tial en la supozita rekaptan, oni devas transformi lin en "la samon".

Tion, ke la artisto estas edukita en diverseco, oni vidas en ties ekstravaganca vestaĵo kaj konduto. Li pensas sin kaj vidas sin malsama, sed lia produkto finfine estas alia ero por hormoneiga adhero de ĉiuj diferencoj kaj aliecaĵoj. Ĝi estas alia agento de kultura globigo.

Plurismo predikita kaj perfermita finas en apologion de totalismo dolĉa de socidemokratia

kratioj, kiu limigas nian identecon al ĉies same.

Finfine, la meĥanismo politiko kiu kuŝas en la bazo de tiu solvado de la aliulo, kiel diferenca, estas konsento. En ĝi funkcias ŝajno pri la kantia *kvazaŭ*. Do mi pruntedonas orelon al alia homo, sed mi ne aŭskultas lin aŭ ŝin. Stariĝas prokrastita neado de la aliulo ĉar, definitive, mi serĉas savi la diferencojn malkreskiĝante ilin al la samo.

Tiu estas la lastkialo pro kiu ni proponas de kelkaj jaroj la teorion de malakordo, kiu venas el akcepto reala kaj efektiva de la principio de diferenco, kaj havas la postulon povi vivi en tiu diferenco. Kaj tiu estas la kialo pro kiu oni bezonas fari metapolitikon: disciplino, kiu enhavas la postulon identigi en zono de politiko monda, regiona aŭ nacia, la diferencon ideologian, provante transformi tiun diversecon en koncepton de kompreno politika laŭ la saĝa opinio de Giacomo Marramao.

Malakordo devus esti la unua paŝo fari politiko publika vera kaj la metapolitiko, la enhavo filozofio kaj aksiologio de la politika agento.

## **Pri aprilo 28<sup>a</sup>**

Ŝajnas que finfine la prezidento de Hispanio finfine akceptas, ke oni devas honori sian promeson. Prezente sian Voĉdono da cenzuro, pasintan junion, li promesis, ke li nur deziras okazigi voĉdonado por ke la popolo hispana elektu novan registaron (eble socialisma), sed tuj kiam li vidis sin Prezidento, li ne emis honori tiun promeson.

Komunista partio PODEMOS (nun rebaptita kiel UNIDAS PODEMOS), postulis kelkajn kondiĉojn,

por ke ili apogos socialisman partion PSOE. Sed nun ili estas tre koleraj, ĉar Pedro Sánchez ne plenumis sian promeson al ili, kian ajn ili estas. Same okazas pri sendependistoj, kiujn ne kontentigas la etaj paŝoj al ili de nia Prezidento.

Dekstrismaj partioj CIUDADANOS (civitanoj), PP kaj VOX (*voĉo*, en la latina lingvo), aliflanke, vidas la agadon de Pedro Sánchez kiel tro danĝeran, ĉar li cedis al kelkaj petoj de sendependistoj. Ĉiuj partioj, eĉ dekstrismaj Ciudadanos kaj PP parolas pri VOX kiel "ekstremdekstra" partio, sed se oni vidas la petojn de tiu partio, kiuj baze estas, ke oni plenumu la leĝon, oni ne povas ne demandi al si ĉu tiuj fifamigantoj frenezigiĝas, ĉu ili honeste konsideras, ke plenumi la leĝon estas ekstremodekstra doktrino.

La plej grava afero kiun



Pedro Sánchez preparolas dum tiu tempo, kiun li regas kiel Prezidento, estas, ke oni devas eltombigi Fransiskon Frankon. Post pli ol ok monatoj oni anoncas, sed la Diktatoro ade kuŝas tie, kie li estis de 1975, la Valo de la Falitoj. La familio tute ne volas, ke oni faru tion, sed se oni devas, ili diras, ke oni reentombigu lin en La Almudena, la katedralo de Madrido, kie ili posedas kapelon. La registaro ne volas tion fari, ĉar multe da dekstruloj kaj mirantoj de la Generalo irus tien kiel pilgrimoj, do ili volas, ke oni kaŝu la kadavron de la Generalo aliloken, por ke oni ne plu vidos lin. Sed, bedaŭrinde, eĉ se la registaro truke faras leĝon, ili nepre devas plenumi ĝin, kaj ne povas prifajfi pri la deziroj de la familio. Laŭ mi, la plej bona afero pri tio estus lasi la Generalon en la Valo de la Falitoj, kaj forgesi pri li. Fakte, post tiom da

tempo neniu memoris pri la Diktatoro, sed pro la insistado de socialistoj kaj komunistoj de PODEMOS, li remodiĝis denove.

Nun estas multe da prognozo pri la venonta balotado. Ĉiu partio parolas pri sia privata prognozo, kaj evidente ĉiu diras, ke ili venkos. Socialistoj diras, ke estos grava katastrofo, ke ekstremdekstro regos la landon, dum dekstraj partioj diras, ke socialistoj jam rabis sufiĉe, kaj oni devas havi alian registaron por malkaŝi la tutan rabaron de maldekstro. Fakte oni nun scias, ke en Andaluzio mankas miloj da milionoj da eŭrojn, inter ili la necesa mono por ke dependuloj ne mortus..., fakte 28 000 el ekzistantaj 35 000 jam mortis pro manko da mono por helpi ilin. Mi dubas ĉu iu respondecos pri tio ĵure, aŭ eĉ politike..



**VEGAMEDIA PRESS.COM**  
Toda la verdad, solo la verdad y nada más que la verdad

Miércoles, 10 de abril de 2019  
Última actualización: Domingo, 7 de abril de 2019 10:25



[Hemeroteca](#) | [Publicidad](#) | [Nosotros](#) | [Temas de actualidad](#)

Portada	Discantus Magazine	La toga solidaria	Editorial	Enfocando Murcia	Opinión	Región	Política	Actualidad	Murcia	
Cartagena	Vega Media	Mazarrón	Valle de Ricote	Belleza	Laboral	Tribunales	Medio Ambiente	Entrevistas	Armenia	Economía
Deportes	Cultura/Ocio	Club VMpress	Empresas	Hablando de libros	Guía Gastronómica	EUGEN				

## ***Etaj partioj***

Laŝtan 10<sup>an</sup> de aprilo mi devis gvidi programon en Vegamedia-Press Televido, en Mursjo. Mi kutime publikigas artikolojn opiniajn en tiu ĵurnalo, kaj la direktoro proponis al mi, ke mi estu subdirektoro de la televido kaj enkondukanto de la politika debato.

En Hispanio nur grandaj partioj, kiel PP, PSOE, PODEMOS, CIUDADANOS, aperas en televido, sed ili malofte esprimas la deziron de la hispana popolo, sed inverse la hispanaj ĵurnaloj kaj ceteraj komunikaj amasmedioj anstataŭas la publikan opinion de la publikigata opinio, kiun oni ne scias kiu decidus vere. Sed en nia



debato neniu el tiuj ĉarlatanoj venis, sed **Maldekstro Pozitive, Eltonda Nulo, kaj Demokratio Plura.**

Anstataŭ disputo inter ili tri, nia formulo estis pli civiliza: la enkondukanto, tio estas mi, proponis ses demandojn, kaj ili respondis unu post la alia antaŭ scii la sekvontan demandon. Estas agrable strange konstati, ke ne estis granda diferenco inter ili tri, eĉ se la sinteno de la tri partioj ne estas koincida. Mi kreas,



ke tio okazis ĉar ili aŭskultis unu la aliajn. Eble la grandaj partioj farus same, se ili koncentriĝus pri tio, kion ni atentis en tiu intervjuo triobla: komunajn problemojn de Hispanio. Eble estas diversaj manieroj solvi problemojn, sed kiu partio dirus, ke la problemoj de nia lando ne interesas al ili?

Mi aldonas la ses demandojn, por ke leganto demandos sin ĉu lia aŭ ŝia prefera partio politika donos solvon al ni:

- 1 Prezentu vian partion, kaj esprimu vian esperon antingi ion.
- 2 Motivoj konkurenci en la balotado. Celoj kaj kialoj.
- 3 Kiel vi rigardas la politikan scenejon en Hispanio post la malapero de dupartismo?
- 4 VOX kaj PODEMOS: ĉu populismoj? Ĉu estas ekstremoj samaj?
- 5 Problemoj pri la Maro Minora, kaj 20 jaroj da korupteco de PP.
- 6 Kiaj estas la plej gravaj problemoj de Hispanio nun?

Mi povas diri, ke tiuj tri partioj havas kandidatojn por ĉiu loko en Hispanio, entute po 52, kaj iliaj proponoj por solvi tiujn problemon ŝajnis al mi justaj kaj ĝustaj. Venis la aferon pri utila voĉdono, kiu estas fortigita de la nuna balotsistemo en Hispanio: tiujn voĉdonojn, kiuj ne aldoniĝas sufiĉe nombre por nomumi deputiton, ricevas venkintaj kandidatoj procente al sia totala nombro da voĉdonoj. Ankaŭ, ĉiu partio politika en Hispanio ricevas preskaŭ €1 pro ĉiu voĉdono, kaj sekve eĉ se vi donas ĝin al unu el tiuj malgrandaj partioj, ĝi povas finfine iri al deputito de tiuj grandaj, kiujn vi neniam voĉdonus. Sekve, vi decidu, ĉu vi deziras provi gajni deputiton de malgranda, pli honesta partio, eĉ se vi sensukcese nur kontribuos al granda, bedaŭrota partio en la

estonto, ĉu vi sindetenas kaj elektas ne voĉdoni.

La afero estas pli komplika ol ĝi ŝajnas: se vi ne voĉdonas, vian voĉon oni ne povos aldoni al venkintoj partioj, sekve estas triste amuze, ke la sola voĉdono, kiun oni neniam perdas, estas tiu, kiun oni ne donas. Kialojn ne voĉdoni ne mankas, sed mi diskutos la aferon en alia artikolo. Mi nur notigas ĝin nun kiel eblecon.

Aliflanke, oni povas kuraĝi subteni partion, kiu nun komencas. Tio estus danki la penon kaj iniciaton de David Kevin López Ruiz (Izquierda en Positivo), María Fuensanta Garcés de los Fayos (Recortes Cero) kaj Francisco Miguel Muñoz Garre (Democracia Plural). Ni notu, ke la lasta kandidato ankaŭ estas esperantisto.

## **Neperfekta estonto**

**A**ŭskultante maldekstrulojn fanatikajn en nuna Hispanio, ŝajnas, ke oni ŝuldas ion al ili. Fakte ili malvenkis la militon je 1939 pro siaj sensencaj decidoj tiutempaj. Ili kredis siajn sloganojn, kaj perforte rabis havaĵojn al homoj, kiuj havis ilin, mortopafis homojn pro tio, ke ili havis alian ideologion, ĉu religian, ĉu politikan, ĉar esence ĉiu sufero estas rajtiga por revolucio, kaj kiam ili perforte estis venkitaj de la plejparto de la hispana armeo, ili komencis militon propagandan bazite de mensogoj kaj malamo. Tiu propagando daŭras eĉ hodiaŭ, kaj se oni provas rezoni kun tiuj fidirantoj, ili reagis insulte kaj agreseme, ĉar laŭ ili oni nepre estas faŝisma por povi diri tion. Do, estas du tipoj da hispanoj: faŝistoj kaj maldekstruloj, laŭ ili.

Jes, estas ridinde, ke oni diris, ke PP estas ekstremdekstra partio, kaj nun ekstremdekstro estas VOX, kaj ne plu PP, eĉ se la programo de PP nun estas pli dekstrisma ol ĝi estis en la tempo, kiam Marjano Raĥoj prezidis la partion.

Simile al tio, kion Paŭlo Iglesias, gvidanto de PODEMOS, diras, enkondukante siajn argumentojn, *ne mi diras tion, sed...*, nun ne nur mi diras tion, sed nuna realo diras pri tio, kio okazas, kiam komunismo regas landon. Oni ne vere konis komplete tion, kio okazis en Sovetunio en ties tempoj, sed nun oni konas pri tio, kio okazas en Venezuelo. Je 1998 la Movo Kvina Respubliko, gvidata de Hugo Rafael Chávez Frías (plej vaste konita kiel **Ugo Ĉaves**), ricevis plenplenon da apogo de voĉdonantaro, kaj starigis la unuan maldekstran registaron en la lando. Tiu partio poste transformiĝis je 2007 en PSUVn, la Partio Socialisma Unuiĝinta de Venezuelo. De tiam ĝi estas en povo, spite al la denoncoj internaciaj pri balota friponado. De la tempo de Ugo Ĉaves la ŝtato prenis privatajn

entreprenojn, kaj femis aliajn, kiuj estis kritikaj al la registaro.

Sed plej gravaj aferoj okazis post la morto de la gvidanto. Nikolao Maduro sukcesis konservi la registaron, malgraŭ tio, ke la ekonomio malpliboniĝis terure, ĉar fakistoj estimas ĝin ĉirkaŭ dek milionoj procento rilate al 2017, la plej alta registrita en la historio de la mondo. Aldone, estas manko da elektriĝo en moderna, riĉa lando, almenaŭ ĝis kiam tiu partio venis en povon. Ilia promeso fini la stratmurdado ne nur ne estis plenumita, sed nun estas multe pli kreskigita, ĉefe pro la agado de Kolektivoj, kiuj estas aroj da apogantoj al la reĝimo, al kiuj oni ne plu povas pagi, sed kiujn oni ne prosekutas pro ties murdado kaj rabado al senkulpa popolo.

En Hispanio nun estas mirantoj de tiu reĝimo, kies mankojn oni ne rigardas, kaj reagis agreseme, se oni notigas ilin pri ĝi. Oni energie asertas, ke ne interesas al ili Venezuelo, sed Hispanio. Kaj ankoraŭ estas tiuj, kiuj sekvas ilin, kvazaŭ ne gravus al ili, ke en la estonto simila partio al tiu de Ugo Ĉaves regos en Hispanio. Sed en ĉiu lando, kie komunisma partio prenis povon, ĝi neniam forlasis ĝin se la tuta lando ne estas ruinigita, kiel okazis en Sovetunio kaj nun en Venezuelo. Infanoj mortas en kovaparatoj pro manko da elektriĝo, plenkreskuloj mortas pro manko da manĝaĵoj kaj medicinoj, lando mortas pro manko da zorgado, socio mortas pro manko da libereco. Ĉu vere oni deziras tion por Hispanio?



Amasa elmigrado tra la venezuela landlimo.

## ***Sub alies flago***

**D**iferenco inter **laboro** kaj **servado** estas, ke la unuan oni faras pro mono, kaj la duan pro altruismo, deziri fari ion por aliaj (*alter*, en la latina). Venas al mia menso ekzemplo tre grafika kaj persona: mi faris la armean servadon, devige, certe, sed lerni defendi sian landon, se venus la neceso, estas la minimuma afero, kiun oni povas fari danke al tiuj, kiuj donis al oni lingvon, societon en kiu oni vivas, kulturon kaj historion, inter aliaj bonaĵoj, kiujn oni ĝuas, kvankam homoj de la estanto sentas sin kun rajto ĝui ĉion sen fari laboron iel inda reciproke al ĉio donace ricevita, aŭ eĉ intenci tion. Aliaj povas fari same pro mono, evidente. Oni nomas ilin **mercenaroj**. Ili ankaŭ defendas vian landon, sed ili faras tion nur pro tio, ke vi pagas ilin, vole-nevole, pere de viaj impoŝtoj. Mi memoras ke je la armeservo mi ricevis manĝadon (tre bongusta, interkrampe) trifoje tage kaj mi dormis en senpaga tabullito en dormoĉambro kie aliaj du cent homoj dormas ankaŭ. Mi ankaŭ ricevis iom malpli ol €2<sup>ojn</sup> monate, 300 pesetojn. Fakte ĝi estis simbola salajro eĉ en tiu tempo, la Hispanio de 1975.

Hodiaŭ estas homoj, kiuj diras, ke ili servas socion kaj zorgas pri nia estonto, nia estanto, kaj nia bonfarto; kaj sekve ili ellaboras leĝojn, kiuj garantias nian bonfarton kaj kunvivadon. Sed ili ne ricevas €1.8<sup>ojn</sup> monate, kaj ilia salajro ne estas simbola eĉ laŭ hodiaŭa normo, eĉ se oni konsiderus tia la minimuman intermetian salajron, kiu estas la limo, kiun oni povus konsideri simbola. Ili ricevas multe pli. Ili estas mercenaroj. Ilin oni luas kontraŭ salajro, kies kvanton ili mem decidas, sed kiam la leĝo konfliktigas ilian intereson aŭ tiun de iliaj partioj kontraŭ tiu de la cetero de la socio,



ili adaptigas la leĝon al interesoj, kiuj ne estas tiuj niaj, de la popolo. Tial ili estas privilegiite proktetitaj de leĝo. Por atingi la postenojn de deputito aŭ senatano ili devis unue aliĝi al partio politika. Ĉiun partion difinas aparta ideologio, kiu kondiĉigas la politikan agadon de ties deputitoj, kaj ellaborante leĝojn ili kondiĉigas la komunan bonfarton al tiuj ideologioj. Poste deputitoj voĉdonas laŭ sia ideologio kaj sub la ordonoj de gvidanto de partio, kiu punas ilin, se ili ne obeas, kvankam tion malpermesas la Konstitucio nun en Hispanio (artikolo 67-2: «La anoj de la Ĝeneralaj Kortumoj ne estos ligataj de imperativa ordono»). Sed okazas nenio, ĉar eĉ se ili ne havas aŭtoritaton (moralan), ili havas la forton (de la leĝo, kiun ne vane ili mem faras): jen la kerno de la **divorco inter leĝo kaj justico** en Hispanio: **La leĝo ne fontas el popolo**, sed el partioj, kaj tiu estas la **bazo de la politika korupteco**, kiu generas ĉiujn aliajn koruptojn, kaj aldone estas la unua kaŭzo de la manko de demokratio en Hispanio.

Sed ni ne bezonas korpon da mercenaroj, kiuj dediĉas sin al farado de leĝoj por altrudi siajn ideologiojn, kiujn ni nek volas nek bezonas sur nin. Ni **ne bezonas** novajn **ordonojn**, sed **plibonigon** de niaj **vivkondiĉoj**. Kaj tion oni ne atingas plenigante la landon de imoŝtojn mallegitimajn aŭ krimigante duonon de Hispanio pro tio, ke ĝi estas vira. Tien kondukis permeseco lasi trudi al ni tiun ideon, ke ideologio estas bona, aŭ ke ĝi utilas al io. Laŭ la ĵusa historio de Hispanio ĝis nun ĝi utilis nur por ke kelkaj individuoj atingis postenojn per kiuj ili ricevas salajrojn skandalajn pro nulaj servoj al la patrio, sed anstataŭ ili ŝirmis sian ĉeestadon en povo. **La povo fari nenion**, kion ili **promesis** antaŭ veni en povon.

Ne, **ili ne reprezentas nin**, kaj ne pro tio, ke nur mi diras tion: la Konstitucio de 1978 mem, kiu **ne permesas** al ni **elekti** niajn **reprezentantojn** sed nur voĉdoni por ili. Ĉar tiuj, kiujn ili reprezentas estas nur siaj politikaj gvidantoj, kiuj elektas ĉiujn kandidatojn, kiujn poste la popolo privoĉdonas. Ankaŭ la Konstitucio diras, ke **La Kongreso de Deputitoj elektas la Registaron** pere de plimulta voĉdonado (artikolo 99<sup>a</sup>, punktoj 1 kaj 3). Tio estas, ke laŭ la **Deklaracio pri Rajtoj de Homo kaj Civitano** de 1789, en Hispanio ne ekzistas demokratio, ĉar por ke ĝi okazu devige devas ekzisti reprezenteco (kiu ne estas) kaj apartigo de povoj (kiu ankaŭ mankas). Pro tio **en Hispanio ne estas demokratio ĉar tiel diras la leĝo**. Leĝo, kiun, malgraŭ ties ĉefaj beneficuloj, partioj politikaj, perfortas ree, kvazaŭ ili estas super la leĝo. Eble tio veras.

Jen tial, kial ne voĉdonas. Tio estas la sola povo, kiun civitanoj havas: se ili volas, ke ni voĉdonu la nelegon, ni ne voĉdonu ĝin, en la espero, ke tio iam venigos la demokration finfine. La tagon, kiam estos servistoj publikaj anstataŭ mercenaroj, se oni sukcesas venigi demokration vere, kaj ne tiun falsajon kiun ili nomas tiel, kaj se iu gajnas mian voĉon, nur tiam mi iros voĉdoni. Dume, vi estu atentigitaj pri la ridindigo, kiu venas la venontan 28<sup>an</sup>.

## **Programoj '19**

**B**edaŭrinde en Hispanio oni ne legas la programojn, kiujn la politikaj partioj prezentas okaze de balotadoj. Mi memoras, ke iam knabino rigardis al mi kun miro pro tio, ke mi legis la programon de ĉiu partio en balotado de antaŭ kelkaj jaroj. Miron devus kaŭzi la nerespondeca fakto, ke oni voĉdonas sen legi almenaŭ unu fojon la programon de ĉiu politika partio, kaj se neniu el ili konvingas onin, ne honeste povus voĉdoni oni.



Sed, bedaŭrinde, oni ne voĉdonas programon en Hispanio, sed ideologion. Oni ne voĉdonas por, sed kontraŭ homoj, kiuj ne estas en listo pro siaj ideoj, sed pro fideleco al la ideologio de sia koncerna partio. Sed, tamen, voĉdonantoj kredas, ke ili voĉdonas ilin kaj ne ĝin. Ili ne estas senkulpaj, kompreneble, ĉar ili devus legi la programon de ĉiu partio, kaj poste oni devus postuli, ke la venkinto plenumu sian programon. Sed kutime voĉdonanto ne estas interesita pri tio, ĉar ĉio, kio gravas, estas ke sia partio regas. Nekredeble, en Hispanio politiko estas same kiel Futbala Ligo: venkinto humiligas venkitojn.

Aldone, oni pretas kredi ĉion, kion diras sia partio, kaj eĉ ne volas scii pri tio, kion aliaj partioj diras. Estas tre larĝe disvastigita inter ni kruda manikeismo, kiu blindigas voĉdonantojn, kaj pro tio gvidantoj kiel Zapatero kaj Sánchez povas atingi povon kaj ruinigi la landon. Ili nur volas povon, la povo fari nenion utilan...

## La peko de l' taliban<sup>1</sup> Kvara parto: Benazir: 11 Koŝmaro

**N**oktomeze li vekiĝas nerveze. Io mankas al li. Ne estas la brakoj parfumitaj de sia amata edzino Benazir'. Li malfermas siajn okulojn, timante, kaj rigardis ĉirkaŭ sin, kaj unue li ne konis la ĉambron, kie li estas. La fenestro estas je la alia flanko... Li staras kaj malfermas la fenestron, kaj la lumo de la Luno diras al li sekreton: tiu estas lia ĉambro ĉe sia patro! Li ne uzis ĝin de antaŭ kvardek jaroj. Li malfermas sian dormoĉambron kaj tio, kion li vidas, tute ne trankviligas lin: Ibrahim' kaj Zulem' dormas trankvile. Li eniras la alian ĉambron, kaj tie dormas fratino Sanj'..., dekjaraĝa!

Li rapide vestas sin kaj eliras la domon. Liaj paŝoj gvidas lin ekster la urbon, al la loko, kiun li malamis dum multe da jaroj. Tie li vidas aron da hundoj, kiuj rigardas al li agreseme, kaj grumblas kaj bojas malame al li. Li ekŝtonigas ilin ĝis kiam la hundoj jam forestas. Li disŝiras branĉon el olivarbo kaj faras bastonon por defendi sin, se la hundoj revenos. Poste li rigardas la lokon, kie ili estis. Li trovas homajn restaĵojn sangajn kaj iom da haŭto kaj muskoloj. Kiam li ekkomprenas tion, pri kio temas, li teruriĝas kaj esploras tre laŭte, disŝirante siajn vestaĵojn:

«Rejin'! Mia dolĉa Rejin'!»

Ĉar hundoj malsubterigis la restaĵojn de tiu kompatinda knabino malhonorigita dufoje tiun teruran tagon..., unue pro virvolupto, kaj poste pro netoleremo, mensfermeco kaj kordureco de viroj, kiuj ne kapablis kompreni la vortojn de Dio sur La Libro, kaj ili restis je la supraĵo de la sankta teksto, kiu estas tie. Tie restas la malmultaj ostoj, kiuj ankoraŭ ekzistas de tiu virino, kiun li amis en alia vivo kaj kiu donis al li kvin gefilojn. Per la bastono kaj siaj manoj li enprofundigas la truon en kiu li kaj liaj senkompataj, senraciaj kunantoj forlasintis ŝin, kaj poste li metis tion, kio ankoraŭ restas pri ŝi multe pli profunde. Li kalkulas, ke estis ses hundoj. Li persekutis ilin kaj ĉasis ilin unu post la aliaj. Li batis ilin per la bastono, kaj poste li mortigis ilin ĉiujn per sia tranĉilo. Neeblas, ke ili jam digestis ŝin dum tiu mallonga tempo, do li venigas la ses kadavrojn en la tombejon, kiun li faris per siaj propraj manoj, kaj metas ilin sur la malmultaj restaĵoj de la knabino, kiujn la hundoj ne havis tempon manĝi. Poste li plenigas la truon per sablo, kaj lasas la bastonon sur la tombo je vertikala pozicio. Nun tie, meze de la ĉielo, la lunduono atestas la plej bonan agon sian de la tago, kiu tamen ne nuligas la fian kaj mizeran eraron, kiun li faris tian matenon. Poste, per voĉo malakuta pro ploro, kun manko da spiro fojfoje, li denove diras:

Dio estas kompatema, pia kaj fidela kun fidelo kaj malfidelo, kun lojalo kaj mallojalo, kaj Sia Koro doloriĝas pro manko da virto de la duaj, eĉ se Ĝi ĝojas pro la penton, kiu alproksimigas la duajn al la unuaj.

*Aŭskultu, Dio, mian ploradon,  
kaj taksu mian penton.*

*Dum mia tuta vivo mi malamas ne kompreni vin  
kaj pro tio mi murdis la plej belon, kiun mi konis.  
Pardonu min, Dio,  
pardonon petegas mi  
kaj ricevu, petas mi vin  
kaj ĝoju la kuneston  
kiun mi ne povis.*

Li ankoraŭ ploris sidante sur ŝtono ĝis la momento, post kelkaj horoj, kiam li rimarkas presencon. Li levas sian rigardon kaj vidas malnovan konatulon, la fakiron, kiun li vidis en la dezerto tiun saman tagon, samtempe kvardek jarojn pli frue:

«Pro El Fu!»

«Longan sonĝon vi havis, Abdul' Saleh!».

«Ĉu sonĝo? Ĉu mia vivo kun Aben' ne estis reala?»

«Ne. Sonĝo estis, nenio pli».

«Ĉu vivo mia kun Rejin' estis fraŭdo?»

«Jes. Dio amas vin kaj montris al vi la vojon, sed kion oni faris, farita restas. Oni ne povas malfari. Oni povas fari bonajn aferojn en la estonto. Ne estu fia denove, kaj ne kulpu Dion».

«Sed...»

Antaŭ li, lia malnova amiko, ĉu anĝelo, ĉu diablo, sed ĉiam la bona Pro El Fu, malaperas same kiel nokto malaperas kiam radioj de la suno sangigas la horizonton.

Abdul' Saleh' sentas sin subite kvazaŭ oni batadas lin. Ĉu ĉio estis koŝmaro, eĉ la morto de sia amata Rejin'?

Sed ne, tie kuŝas tiu vertikala bastono, kaj la premita grundo, kiu atestas lian postmortan laboron. Kaj ankaŭ pri tio, ke li ĵus rompis la tradicion de sia popolo: li entombigis malpuran virinon. Li nun estas malpurulo, kaj oni povas mortigi lin pro tio.

Li kliniĝas pro la ridatako, kiun li subite suferis. Li ekridegaĉis pri siaj tradicioj bazitaj sur turpa interpretado de La Libro, teksto tro simpla por la malsimplaj mensoj de sklavo de litero.

Li revenas en sian domon kaj enlitiĝas antaŭ la unuaj najbaroj vekigis. Neniu vidis lin foriri, neniu vidis lin reveni. Nur ses hundoj, kiuj ne plu respiros, kaj ankaŭ Mistera Luno.

*Daŭrigota...*



## La Faraono

Ĉapitro 53<sup>a</sup>

La soldatoj, starantaj garde en la antaŭĉambro, anoncis Pentueron. La pastro falis antaŭ la Faraono sur la vizaĝon kaj demandis pri ordonoj.

- Mi ne volas ordoni, sed peti vin —diris la sinjoro. —Vi scias, oni ribelas! Ribelas la kamparanoj, metiistoj, eĉ malliberuloj... Ĉie ribeloj, de la maro ĝis la minejoj... Mankas nur unu afero, ke ribelu miaj soldatoj kaj proklamu Faraono... ekzemple Herhoron!
- Vivu eterne, via sankteco! —respondis la pastro. —Ne ekzistas en Egipto homo, kiu ne oferus sian vivon por vi kaj ne benus vian nomon.
- Ha, se ili scius, —diris la estro kun kolero —kiel malriĉa kaj senforta estas la Faraono, ĉiu nomarĥo volus esti sinjoro de sia nomeso! Mi pensis, ke heredinte la duoblan kronon, mi ion signifos... Sed jam en la unua tago mi konvinkiĝis, ke mi estas nur ombro de la antaŭaj monarĥoj de Egipto! Ĉar kio povas esti Faraono sen mono, sen armeo kaj, antaŭ ĉio, sen fidelaj servistoj..? Mi estas kiel la statuoj de l' dioj, kiujn oni incensas kaj al kiuj oni faras oferojn... Sed la statuoj estas senfortaj kaj per la oferoj sin grasigas la pastroj... Sed vi ja apartenas al ilia partio!
- Dolore estas por mi —respondis Pentuer —ke via sankteco parolas tiel en la unua tago de sia regado. Se la novaĵo disvastiĝus en Egipto...

—Al kiu mi devas paroli pri tio, kio doloras min..? —interrompis la sinjoro. —Vi estas mia konsilanto kaj vi savis min, aŭ almenaŭ volis min savi, ne por rakonti al ĉiuj, mi supozas, kio fariĝas en mia reĝa koro, kiun mi malfermas al vi... Sed vi estas prava.

La sinjoro promenis en la ĉambro kaj post momento diris per multe pli trankvila tono:

- Mi nomis vin estro de la komitato, kiu devas esplori la kaŭzojn de la senĉesaj ribeloj en mia ŝtato. Mi volas, ke oni punu nur la kulpajn kaj estu justa al la malfeliĉaj...
- Subtenu vin Dio per sia favoro! —murmuretis la pastro. —Mi faros, kion vi ordonas. Sed la kaŭzojn de la ribeloj mi konas sen esploro...
- Parolu...
- Multfoje mi parolis pri tio al via sankteco: la laboranta popolo estas malsata, havas tro da laboro kaj pagas tro grandajn impostojn... Kiu antaŭe laboris de la leviĝo ĝis la subiro de l' suno, hodiaŭ devas komenci unu horon antaŭ la leviĝo kaj fini unu horon post la subiro.
- »Antaŭ ne longe, ĉiun dekan tagon, la laboristo povis viziti la tombojn de la gepatroj, paroli kun iliaj ombroj kaj fari oferojn. Sed hodiaŭ neniu iras tien, ĉar neniu havas tempon. Antaŭe la kamparano manĝis ĉiutage tri tritikajn panojn, hodiaŭ ili ne havas sufiĉe eĉ por hordea. Antaŭe, la laboroj ĉe la kanaloj,

- akvobaroj kaj ŝoseoj estis kalkulataj al la impostoj; hodiaŭ oni devas aparte pagi la impostojn, kaj la publikajn laborojn plenumi senpage. Jen la kaŭzo de la ribeloj.
- Mi estas la plej malriĉa nobelulo en la ŝtato! —ekkriis la Faraono, —lu ajn posedanto de bieno donas al siaj brutoj konvenan manĝon kaj ripozon; sed mia brutaro estas ĉiam malsata kaj laca! Kion do mi devas fari, diru vi, kiu petis min, ke mi plibonigu la sorton de la kamparanoj?
- Vi ordonas al mi, sinjoro, paroli..?
- Mi petas... ordonas... fine, kiel vi volas... Sed parolu saĝe.
- Benata estu via regado, vera filo de Oziriso! —respondis la pastro.
- Jen kion oni devas fari... Antaŭ ĉio, ordonu, sinjoro, ke oni pagu por la publikaj laboroj, kiel antaŭe...
- Kompreneble.
- Poste, proklamu, ke la laboro sur la kampoj daŭru nur de la leviĝo ĝis la subiro de l' suno... poste faru, ke la popolo ripozu ĉiun sepan tagon; ne ĉiun dekan, sed ĉiun sepan. Poste, malpermesu al la sinjoroj doni la kamparanojn kiel pruntgarantion kaj al la skribistoj bati kaj turmenti ilin laŭ sia bontrovo. Fine, donu dekonon aŭ almenaŭ dudekonon de la teroj al la kamparanoj kiel proprajon, por ke neniu povu ĝin repreni aŭ okupi kiel garantiaĵon. Donu, sinjoro, al la kamparanoj dezertajn sablojn, kaj post kelke da jaroj elkreskos tie ĝardenoj...
- Vi bele parolas —intermetis la Faraono —sed vi diras, kion vi vidas en via koro, ne en la mondo. La homaj planoj, eĉ la plej bonaj, ne ĉiam konformiĝas al la natura irado de la aferoj...
- Via sankteco, mi jam vidis tiajn ŝanĝojn kaj iliajn rezultatojn —respondis Pentuer. —En kelkaj temploj oni faris diversajn provojn: pri la kuracado, instruado, edukado de bestoj kaj kreskaĵoj, fine, pri plibonigado de la homoj. Kaj jen kio okazadis: kiam oni donis al kamparano maldiligenta kaj malgrasa bonan manĝon kaj ripozon ĉiun sepan tagon, li fariĝis grasa, laborema kaj fosis pli da tero, ol antaŭe. Laboristo pagata estas pli gaja kaj faras pli multe da laboro, ol sklavo, eĉ batata per feraj vergoj. Homoj sataj naskas pli multe da infanoj ol lacaj kaj konsumataj de la laboro; la idoj de la liberaj homoj estas sanaj kaj fortaj, kaj la idaro de sklavoj estas malsanema, malgaja kaj havas inklinon al la ŝtelo kaj mensogo. Fine, oni konvinkiĝis, ke la tero kulturata de la posedanto, donas unu fojon kaj duonon pli multe da greno kaj legomoj, ol tero, kulturata de sklavoj. Mi diros al via sankteco ion ankoraŭ pli strangan; kiam al la plugistoj ludas muziko, la homoj kaj bovoj laboras pli bone, pli rapide kaj malpli laciĝas, ol sen muziko! Ĉion ĉi oni konstatis en niaj temploj.
- La Faraono ridetis.
- Mi devas enkonduki la muzikon

ankaŭ en miajn bienojn —diris li.

—Sed se la pastroj konstatis tiel strangajn aferojn, pri kiuj vi rakontas al mi, kial ili ne agas tiamaniere kun la kamparanaj en siaj bienoj..?

Pentuer mallevis la kapon.

—Ĉar —respondis li sopirante —ne ĉiuj pastroj estas saĝuloj kaj havas noblajn korojn...

—Jes, jes! —ekkriis la sinjoro. —Kaj nun diru al mi vi, kiu estas filo de kamparano kaj scias, ke inter la pastroj ekzistas friponoj kaj malsaĝuloj, diru, kial vi ne volas servi al mi en la batalo kontraŭ ili..? Vi ja komprenas, ke mi ne plibonigos la sorton de la kamparanoj, se antaŭe mi ne instruos al la pastroj la obeon al mia volo...

Pentuer tordis siajn manojn.

—Sinjoro —respondis li —sendia kaj danĝera estas la batalo kontraŭ la pastraro! Pli ol unu Faraono komencis ĝin, kaj... ne povis fini...

—Ĉar ne helpis lin saĝuloj, kiel vi... —eksplodis la sinjoro. —Kaj vere, neniam mi komprenas: kial saĝaj kaj honestaj pastroj kuniĝas kun la bando de friponoj, kiaj estas la plimulto de ĉi tiu klaso..?

Pentuer skuis la kapon kaj komencis paroli malrapide:

—De tridek mil jaroj la sankta pastraro zorgas pri Egipto kaj ĝi faris la landon tia, kia ĝi estas: mirindaĵo de la tuta mondo. Kaj kial la pastroj, malgraŭ la mankoj, sukcesis tion fari..? Ĉar ili estas la lumingo, en kiu brulas

la lumo de la saĝo. La lumingo povas esti malpura, eĉ malbonodora. Tamen ĝi konservas la dian fajron, sen kiu inter la homoj regus la mallumo kaj sovaĝeco. Vi parolas, sinjoro, pri la batalo kontraŭ la pastraro —daŭrigis Pentuer. —Kia povas esti ĝia rezultato por mi..? Se vi malgajnos, mi estos malfeliĉa, ĉar vi ne plibonigos la sorton de la kamparanoj. Kaj se vi gajnos..? Ho, ne ĝisvivu mi tion! Ĉar se vi rompus la lumingon, kiu scias, ĉu vi ne estingus la fajron de la saĝo, kiu de jarmiloj flamas super Egipto kaj super la mondo... Jen, mia sinjoro, la kaŭzoj, kial mi ne volas min miksi je la batalo kontraŭ la pastraro... Mi sentas, ke ĝi proksimiĝas, kaj mi suferas, ke tia vermo, kiel mi, ne povas malhelpi ĝin. Sed mi ne partoprenos en ĝi, ĉar mi devus perfidi aŭ vin, aŭ Dion, kiu estas la kreinto de la saĝo...

Aŭskultante lin, la Faraono promenis en la ĉambro, meditante.

—Faru —diris li sen kolero —kiel vi volas. Vi ne estas soldato, mi do ne povas riproĉi al vi la mankon de kuraĝo... Sed vi ne povas esti mia konsilanto... Tamen mi petas vin, aranĝu juĝejon por esplori la ribelojn, kaj kiam mi alvokos vin, parolu, kion ordonas al vi la saĝo.

Pentuer ekgenuis kaj adiaŭis la sinjoron.

—En ĉiu okazo —aldonis la Faraono —sciu, ke mi ne volas estingi la dian lumon... Kulturu la pastroj la saĝon en siaj temploj,

sed ili ne detruu mian armeon, ne faru malhonorajn traktatojn kaj... ne ŝtelu. —diris li jam eks-citita —la reĝajn trezorojn... Eble ili pensas, ke mi, kvazaŭ almozulo, starados ĉe iliaj pordoj, por ke ili bonvolu liveri al mi rimedojn por relevi la ŝtaton, ruinigitan per ilia malsaĝa kaj malnobla regado..? Ha, ha! Pentuer... eĉ la diojn mi ne petus pri tio, kio estas, mia potenco kaj mia rajto. Vi povas foriri.

La pastro, ne turnante sin, eliris kaj ankoraŭ en la pordo falis sur la vizaĝon.

La sinjoro restis sola.

«La mortemaj homoj estas kvazaŭ infanoj —pensis li. —Herhor ja estas saĝa, scias, ke Egipto en okazo de milito bezonas duonmilionan armeon, ke ĉi tiun armeon oni devas ekzerci, kaj malgraŭ tio li malgrandigis la nombron de regimentoj kaj la nombron de soldatoj en ĉiu. La granda kasisto ankaŭ estas saĝa, tamen ŝajnas al li afero tute natura, ke ĉiuj trezoroj de l' Faraonoj transiris en Labirinton! Fine Pentuer... Kia stranga homo! Li volas donacadi al la kamparanoj manĝon, teron kaj senĉesajn festojn... Bone, sed ĉio ĉi malgrandigos miajn enspezojn, kiuj sen tio estas jam tro malgrandaj. Sed se mi dirus al li: helpu min repreni de la pastroj la reĝajn trezorojn, li nomus tion malpia kaj dirus, ke mi volas estingi la lumon en Egipto! Stranga homo... Li volonte konsentus renversi la

tutan ŝtaton por la bono de l' kamparanoj, sed li ne kuraĝus preni ĉefpastron ĉe la nuko kaj konduki lin en malliberejon. Kun plej granda trankvilo li ordonas al mi rezigni duonon de miaj enspezoj, sed mi estas certa, ke li ne kuraĝus elporti kupran utenon el Labirinto...»

La Faraono ekridetis kaj ree komencis mediti:

«Ĉiu deziras esti feliĉa; sed se vi volas fari, ke ĉiuj estu feliĉaj, ĉiu kaptos vin je la manoj, kiel homo, al kiu oni volas elŝiri malsanan denton... Kaj tial la monarĥo devas esti decidema... Kaj tial mia sankta patro agis malbone, malzorgante la kamparanojn kaj senlime konfidante al la pastroj... Pezan heredaĵon li lasis al mi, sed... ne fleksiĝos sub ĝi miaj ŝultroj... Apud Sodaj Lagoj ankaŭ estis malfacila afero... Pli malfacila, ol ĉi tie... Ĉi tie estas nur babiluloj kaj alarmantoj, tie estis homoj armitaj kaj deciditaj morti... Unu batalo pli larĝe malfermas niajn okulojn, ol dekoj da jaroj de trankvila regado... Kiu diros al si: mi rompos la baron! —rompos ĝin. Sed kiu ŝanceliĝos, devos cedi...»

Falis la krepusko. En la palaco oni ŝanĝis la gardistojn kaj en la pli malproksimaj ĉambroj oni ekbruligis torĉojn. Nur en la ĉambro de l' Faraono neniu kuraĝis eniri sen ordono.

La sinjoro, laca de la sendormo, de la hieraŭa vojaĝo kaj hodiaŭaj okupoj, falis sur la apogseĝon. Ŝajnis al li, ke jam centojn da jaroj

li estas Faraono, kaj li ne povis kredi, ke de la horo, kiam li estis apud la piramidoj, ne pasis ankoraŭ unu tago.

«Unu tago..? Ne eble!»

Poste venis al li la penso, ke eble en la koro de la heredinto loĝas la animoj de la antaŭaj Faraonoj. Sendube estas tiel, ĉar alie de kie estus en li la sento de maljuneco aŭ antikveco..? Kaj kial la regado ŝajnus al li simpla afero, kvankam ankoraŭ antaŭ kelke da monataj li tremis, pensante, ke li ne scios regi.

«Unu tago..?» —ripetis li en sia animo. —«Sed mi estas jam mil jarojn en ĉi tiu loko!»

Subite li ekaŭdis sufokitan voĉon:

—Mia filo! filo!

La Faraono salte leviĝis de la seĝo.

—Kiu estas ĉi tie..? —ekkriis li.

—Mi estas, mi... Ĉu vi jam forgesis pri mi...

La estro ne povis sin orienti, de kie venas la voĉo. De supre, de malsupre, aŭ eble de la granda statuo de Oziriso, kiu staris en la angulo.

—Filo mia —ree parolis la voĉo —respektu la volon de la dioj, se vi volas ricevi ilian benitan helpon... Ho, respektu la diojn, ĉar sen ilia helpo la plej granda potenco estas kvazaŭ cindro kaj ombro... Ho, respektu la diojn, se vi volas, ke la maldolĉo de viaj eraroj ne venenu al mi la ĉeeston en la feliĉa lando de Okcidento...

La voĉo eksilentis. La sinjoro ordonis alporti torĉojn. Unu pordo de la ĉambro estis fermita, ĉe la alia

staris gardistoj. Neniu fremda povis eniri.

Kolero kaj maltrankvilo ŝiris la koron de la Faraono. Kio estis tio? Ĉu vere parolis al li la ombro de la patro, aŭ ĉu la voĉo estis nur nova trompo de la pastroj?

Sed se la pastroj povas paroli al li de malproksime, malgraŭ la dikaj muroj, ili povas ankaŭ sekrete aŭskulti. Kaj tiam li, la sinjoro de l' mondo, estas kvazaŭ sovaĝa besto, persekutata de ĉiuj flankoj.

Estas vere, ke en la palaco estis ordinara afero aŭskulti ĉe la pordoj. Sed la Faraono pensis, ke almenaŭ lia kabineto estas libera, kaj ke la trokuraĝo de la pastroj haltas ĉe la pordo de la plej alta povo.

Sed se tio estis spirito..?

La sinjoro ne volis vespermanĝi kaj iris dormi. Ŝajnis al li, ke li ne ekdormos; sed la laciĝo superis la eksciton.

Post kelke da horoj vekis lin sonoriloj kaj lumo. Estis jam noktomezo, kaj la astrologo venis prezenti al la sinjoro raporton pri la situacio de la steloj. La Faraono aŭskultis ĝis la fino kaj diris:

—Ĉu vi ne povus, respektinda profeto, en la estonteco prezenti la raportojn al la nobla Sem..? Li ja anstataŭas min en la aferoj, kiuj koncernas la religion...

La pastron astrologon forte mirigis la indiferenteco de l' Faraono al la ĉielaj aferoj.

—Via sankteco bonvolas forpuŝi la konsilojn, kiujn la steloj donas al la monarĥoj..?

—Donas..? —ripetis la Faraono. —Diru do, kiaj estaj iliaj promesoj por mi?

La astrologo sendube atendis tian demandon, ĉar li respondis sen pripenso:

- La horizonto estas por momento vualita... La sinjoro de l' mondo ne trovis ankoraŭ la vojon de la vero, kiu instruas ekkoni la volon de la dioj. Sed pli aŭ malpli baldaŭ li trovos ĝin, kaj sur ĝi longan kaj feliĉan vivon, plenan de gloro regadon...
- Bone! Mi dankas vin, sankta viro. Nun kiam mi scias, kion mi devas serĉi, mi obeos la konsilojn, kaj vin mi ree petas, ke de nun vi komunikiĝu kun la respektinda Sem. Li estas mia anstataŭanto, kaj se vi legos ion interesan en la steloj, li komunikos al mi matene...

La pastro forlasis la dormoĉamb-  
ron, balancante la kapon.

- Oni interrompis mian dormon!  
—diris la sinjoro kun malkontenta mieno.
- La plej respektinda reĝino Nikotris  
—diris subite la adjutanto —antaŭ unu horo ordonis al mi peti aŭdiencon de via sankteco...
- Nun..? Noktomeze..? —demandis la sinjoro.
- Jes. Ŝi diris, ke noktomeze via sankteco vekiĝos...

La Faraono pensis momenton kaj diris al la adjutanto; ke li atendas la reĝinon en la ora salono. Li pensis, ke tie neniu povos aŭskulti ilin.

La sinjoro ĵetis mantelon sur siajn ŝultrojn, surmetis nelaĉitajn sandalojn kaj ordonis bone lumigi la oran salonon. Poste li eliris, ordonante, ke la servistoj ne akompanu lin.

La patrinon li jam trovis en la salono, en funebraj vestoj el dika tolo. Ekvidinte la Faraonon, la

respektinda sinjorino volis ree fali sur la genuojn, sed la filo levis ŝin kaj ĉirkaŭprenis.

- Ĉu okazis io grava, patrino, ke vi interrompas vian ripozon en tiel malfrua horo? —demandis li.
- Mi ne dormis... mi preĝis...  
—respondis ŝi. —Ho mia filo, vi bone divenis, ke la afero estas grava! Mi aŭdas la dian voĉon de via patro...
- Vere? —diris la Faraono, sentante, ke la kolero plenigas lin.
- Via senmorta patro —daŭrigis la reĝino —diris al mi plena de malĝojo, ke vi suriras eraran vojon... Vi malrespekte forpuŝas la ĉefpastran rangon kaj malestime agas kun la diaj servistoj.
- «Kiu restos ĉe Ramzes —diris via dia patro —se li malkontentigos la diojn kaj se forlasos lin la sankta pastraro..? Diru al li... diru al li —ripetis la respektinda ombro —ke tiamaniere li pereigos Egipton, sin mem kaj la dinastion...»
- Oh, oh! —ekkriis la Faraono —jen kiel ili minacas min tuj en la unua tago de mia regado! Mia patrino, la hundo plej laŭte bojas, kiam ĝi timas, do la minacoj estas malbona antaŭdiro, sed nur por la pastroj!
- Sed tion diris via patro... —ripetis la ĉagrenita reĝino.
- La senmorta patro kaj la sankta Amenhotep —respondis la Faraono —konas mian koron kaj vidas la plorindan staton de Egipto. Kaj ĉar mia koro volas relevi la ŝtaton, forigante la trouzon, ili do ne —povus min malhelpi plenumi miajn intencojn...
- Vi do ne kredas, ke la spirito de via patro donas al vi konsilojn? —demandis la reĝino pli kaj pli

terurita.

—Mi ne scias. Sed mi havas la rajton supozi, ke la voĉoj de la spiritoj, sonantaj en diversaj anguloj de nia palaco, estas ia artifiko de l' pastroj. Nur la pastroj povas min timi; neniam la dioj kaj spiritoj... Do ne la spiritoj timigas nin, patrino...

La reĝino ekmeditis kaj oni povis vidi, ke la vortoj de la filo forte ŝin impresas. Ŝi vidis multajn miraklojn dum sia vivo, kaj kelkaj ankaŭ al ŝi ŝajnis suspektindaj.

—En tia okazo —respondis ŝi, sopirante —vi ne estas singarda, mia filo! Posttagmeze estis ĉe mi Herhor, tre nekontenta de la aŭdienco ĉe vi... Li diris, ke vi volas forigi la pastrojn de la korto...

—Por kio mi bezonas ilin..? Por ke mia kuirejo kaj kelo havu grandajn elspezojn..? Aŭ eble por ke ili aŭskultu, kion mi parolas kaj rigardu, kion mi faras..?

—La tuta lando indignos, kiam la pastroj konigos, ke vi estas malpia... — intermetis la reĝino.

—La lando jam indignas, sed la pastroj estas kulpaj pri tio —respondis la Faraono. —Kaj pri la pieco de la egipta popolo mi komencas havi tute novan opinion... Se vi, patrino, konus la nombron de procesoj pri la malpiaĵoj al la dioj en Malsupra Egipto, kaj pri la ŝtelo en la Supra, vi konvinkiĝus, ke por nia popolo la pastraj aferoj jam ĉesis esti sanktaj.

—Tio estas la influo de la fremduloj, kiuj plenigas Egipton —ekkriis la reĝino. —Precipe de Fenicianoj...

—Indiferente estas, kies; Egipto ne rigardas plu la statuojn kaj pastrojn, kiel superhomajn

estaĵojn... Kaj se vi aŭskultus, patrino, kion diras la nobeluloj, oficiroj kaj soldatoj, vi komprenus, ke venis la tempo meti la reĝan povon en la loko de la pastra, se oni ne volas, ke ĉiu povo falu en la lando.

—Egipto estas via —sopiris la reĝino. —Via saĝo estas eksterordinara, faru do, kion vi volas... Sed agu singarde, ho singarde! La skorpiono, eĉ mortigita, povas vundi la nesingardan venkinton...

Ŝi ĉirkaŭprenis lin, kaj la sinjoro revenis en sian ĉambron.

Li vidis jam klare, ke inter li kaj la pastroj komenciĝis batalo, aŭ ĝustadire io abomena, kio ne meritis eĉ la nomon de batalo kaj kontraŭ kio li, militestro, ne povis trovi en la unua momento efikan rimedon.

Ĉar kie estas la malamiko? Kontraŭ kiu devas marŝi lia fidela armeo..? Ĉu kontraŭ la pastroj, kiuj falas antaŭ li sur la vizaĝon? Ĉu kontraŭ la steloj, kiuj diras, ke la Faraono ne suriris ankoraŭ la vojon de la vero? Kontraŭ kio kaj kontraŭ kiu batali..?

Eble la voĉojn de la spiritoj, sonantaj en la mallumo? Ĉu la propran patrinon, kiu terurigita petegas lin, ke li ne dispelu la pastrojn..?

La Faraono tordiĝis sur la lito, sentante sian senfortecon. Subite venis al li jena penso: "Mi ne atentu la malamikon, kiu disfluas, kiel koto en la mano! Oni babilu en la malplenaj salonoj... oni koleru kontraŭ mia senpieco... Mi donados la ordonojn, kaj kiu kuraĝos ne plenumi ilin, estos mia malamiko, kaj kontraŭ li mi uzos la policon, tribunalon kaj armeon..."

*Daŭrigota...*



# *Kajeroj el la Sudo*

*Bulteno de Hispana Asocio  
de Laboristoj Esperantistaj*



---

<http://www.gazetoteko.com/hale/kels104.pdf>

---

ISSN 1886-1997 (Reta versio)

ISSN 1886-1938 (Printita eldono)



ISSN 1886-1938 (printita)  
ISSN 1886-1997  
Depósito legal: Z-2398-88